

AVANCO

Oficiala Organo de Kuba Esperanto-Asocio
Havano, la 16an de junio, 1989 - Jaro 1-a, n-ro 1 - Prezo: \$1.00

ALPASENI

Esperantisto ĉiam revas pri ŝajne utopiaj faktoj neniam atingeblaj. Jen unu plia provo demonstranta tute malan realon. Ni antaŭteniris novan laboretaĵon, kaj pri tio atestas ĉi unua numero de nia organo AVANCO, kies celo estas unue doni al nia esperantistaro umbilikan ligilon nutrivan kaj dinamisman. Ĝi fariĝos bildo kaj tribunon pri la kuba Esperanto-movado delonge revitaj.

Ni devis trapasi malfavoran ŝtuparon nenien kondukantan dum antaŭaj jaroj. Nia vojo estis plena je malfacilaĵoj ĉefe materialaj. Estis nek sufiĉa maturiĝo niaflanke por entrepreni similan projekton, nek disponeblaj teknikaj rimedoj, presejo, ktp. por realigi tian revon. Nu, ni devige aliris pli simplajn direktojn. Nur okaze de la unua kongreso de KEA ni sukcesis dece eldoni nian bultenon *Kariba Stelo* en presejo de la Scienc-Akademio, kio estis unika ŝanco, domage! Kiel konsekvenco, ni komencis neregule eldoni kelkfolian bultenon per mimeografo, kies celo estis ĉefe informi pri nia agado, ĉar silento preparolas nenion kaj nia movado por esti vera, aktiva, bezonis ligilon.

Nuntempe, kadre de nia Dekjara Jubileo kaj sojle al la 75a UK nialande, niaj antaŭaj eireviĝoj montriĝis puŝiloj por pli agresema entuziasmo. Krome, dum la Internacia Konferenco Esperanto'88 ekzistis unuanima interkonsento flanke de la reprezentantoj de Latinamerikaj Organizaĵoj pri neceso eldoni komunan revuon kapabla montri nian potencialon al la mondo. Pro diversaj kondiĉoj, precipe ekonomiaj, la projekto restis surpapere, tamen ĝi ankaŭ pikis nin labori tiudirekten. Aliflanke materialaj kondiĉoj kaj ŝtata apogo malfermis novajn horizontojn.

Konstateblas tiel, ke nia oficiala organo AVANCO aliras vastan universon. Ne nur kubaj esperantistoj profitos el ĝi, sed ankaŭ ekzistas ebleco, ke niaj regionaj samideanoj interesiĝu pri la revuo kaj alproprigu ĝin al si kiel tribunon por esprimi siajn ideojn kaj interŝanĝi spertojn kun nia esperantistaro.

La revuo ja estas je ĉies dispono, ne nur kiel informilo, sed ankaŭ kiel medio interkomunikiĝi, esprimi ideojn, sendi kontribuaĵojn aŭ simple bildigi la unuopajn movadanojn kaj montri, ke Kuba Esperanto-Asocio progresas, marŝas, saltas... kaj lante kaj rapide, ĉiel avangarde.

AVANCO

Monata Gazeto
de
Kuba Esperanto-Asocio

Poŝtkesto 2018
10200 Havano 2, Kubo

Ĉefredaktorino
Maritza Gutiérrez

Eldona Konsilio
Maritza Gutiérrez
Juan R. Rodríguez
Alberto F. Calienes
Miguel A. Peñate

Kompostis kaj eldonis
Kuba Esperanto-Asocio
Ekspedas: Oficejo de KEA

ENHAVO

Ni jubilas! 3

Nuntempe
Inaŭgurita IEC 5
Unua E-Festivalo 5
22a Konsultiĝo de SLEAJ 6
Konkurso 6
Esperanto en radio 7

Lingve 9

Literature
Tosto por Zonzo 11

Movade
Kiel organizi sciencan
esploron pri E? 15

Deziras korespondi 20

Estimataj gelegantoj!

Tiu ĉi unua numero de nia gazeto enhavas niajn plensvitajn strebojn celantajn omaĝi la datrevenon de KEA. Kompreneble, ni volis havi ĝin preta okaze de la Esperanto-Festivalo en Vija Klara.

Ĝi alportas por vi informojn naciajn kaj internaciajn, literaturon kaj argumentartikolon pri la Esperanto-movado, krom aliajn interesaĵojn.

Nu, ni invitas vin legi ĝin elkore kaj poŝtrevene sendi viajn opiniojn kaj kontribuaĵojn.

Maritza

Ni jubilas!

Maritza Gutiérrez

Jen trafa momento por pripensi la trairitan vojon. Nia asocio fariĝas dekjaraga, kaj pri tio jam oni parolas ekde la komencaj tagoj de tiu ĉi jaro. Fakte, ni klopodas kiel eble plej dece omaĝi ĉi unikan okazaĵon.

Nu, estas bona ŝanco por esprimi kelkajn konsiderojn.

Kiel sciante, antaŭ la jaro 1979 ekzistis nialande nur disa grupeto de esperantistoj, kiuj post multe da streboj sukcesis fondi la nunan Kuba Esperanto-Asocio la 16an de Junio 1979. La tiamaj esperantistoj mem lernis la lingvon kaj decidis ekfunkciigi klasocambrom en la ĉefurba biblioteko Máximo Gómez.

Oni starigis tri-nivelan instrusistemon, kies rezultoj estis entuziasmigaj. Sed poste oni devis serĉi veran lernejon pro la kvanto da intereso; la Kuba Ministerio pri Edukado konsentis pruntedoni al ni lernejon. Sed vere la unuaj seriozaj malfacilaĵoj ekestis kiam fininte la lernadon, la plimulto da gelernintoj for-lasis la movadon, ĉar ne trovis allogon en ĝi. Tio instigis la lernejestrojn kaj KEA-estraranojn serĉi varian-tojn por reteni la finlernintojn. Tiucele ludis grava, sed tre fulmrapida rolo, la tiam ĵusfondita Esperanto-Rondo de Centro Havano, kiu plenumis diversajn Esperanto-arangojn en la lernejo mem.

Dum kelkaj jaroj, krom la lerneja agado, la movado ŝajnis fantomo posedanta nur kapon.

Jam la 3an de januaro 1983 oni malfermis la Centran Oficejon de la Asocio, kiu iom post iom fariĝis renkontiĝejo por aktivuloj, estra-ranoj, movadanoj... krom labori por Esperanto ili ĉiuj praktikas la lingvon kaj ĝuas ĝin.

Sed la lerneja afero restis kerna. Oni ekkomencis eksperimenti diversmaniere, estiĝis lernejoj en aliaj provincoj kaj nia instrusistemo pliboniĝis. Sed, bedaŭrinde mankoj ĉiam trafas nin; malgraŭ pluraj klopodoj la Instruista Sekcio ne sukcesis vere starigi, tamen ni ĉiuj konscias pri la meritplena ĉiutaga laboro de niaj instruistoj; nu, temas ja pri organiziĝo.

Nia Scienc-Teknika Sekcio kaj ties gvidantoj ne sukcesis stabile agi kaj trovi adekvatan manieron allogi fakulojn, tamen estas kontentige scii, ke la medicina grupo jam aliĝis al Universala Medicina Esperantista Asocio (UMEA), kio ja estas rezulto de ilia senĉesa laboro.

Niaj junuloj intertempe klopodis organiziĝi, sed rezultoj vere efikaj estis atingitaj nur flanke de unuopaj kaj ne daŭraj laboroj. Sed, ni diru, ke ĉi-momente ili ekpaŝas pli celtrafe... ni fidu je ilia juna saĝeco.

Aliaj malfacilaĵoj restas duon-solvitaj; ĉiesa tasko estas organiziĝo. Se kie ajn ariĝas, diskutas kaj protokolas esperantistoj, ne restu silentaj kvazaŭ nenio estu okazanta; ni informiĝu kaj informu la ceterajn.

Analizante la lastajn 3 jarojn en la vivo de nia Asocio, tiam rimarkeblas, ke nia bildo nacie kaj internacie fariĝis tute alia. La estraro de KEA ĉe ĉiuj instancoj nutriĝis per novaj aktivuloj kaj kadroj kunportantaj novan agadstilon. Oni antaŭvidis praktikan utiligon de la IL, ne nur ekde movada vidpunkto.

Niaj rilatoj kun ŝtataj instancoj montriĝis ege fruktodonaj kaj por la Esperanto-movado kaj por nia lando. Fakte, ni kreskis kaj atingis plenaĝecon.

La Unua Kongreso de KEA en 1987 sta-rigis antaŭ ni novajn perspektivojn, el kio fontis, kun ŝtata subteno, projekto efektiviĝi nialande la Internacian Konferencon Esperanto'88, kies plej elstara rezulto estis la renkontiĝo inter reprezentantoj de Latinamerikaj Esperanto-Organizaĵoj, kio ebligis unuavice reciprokan interkonatiĝon kaj ankaŭ starigon de kunlaboraj

rilatoj ĉi-hemisfere. Mirigis ĉiujn nia sukceso rilate Esperanto-elsendojn per Radio Havano Kubo, kiu fariĝis internacia tribuno de Esperanto en Ameriko kaj jam aŭdeblas preskaŭ en ĉiuj mondopartoj.

Nia lando jam fondis Internacian Esperanto-Centron... kaj, kiel kolofono, ni gastigos venontjare pli ol 1300 geesperantistojn el la tuta mondo kadre de la 75a UK en Havano, kies Alta Protektanto estas d-ro Carlos Rafael Rodríguez, Viceprezidanto de Ŝtata kaj Ministra Konsilioj de Kuba Respubliko.

Kiel konstateblas, la sanstato de nia Esperanto-Movado estas ege bona. Nur dek jaroj malmankis por digne montri bildon en Esperantio, ĉar kiel estas sciante, nuntempe nia movado eliris ekster niajn limojn, kaj tio ja estas rezulto de nia trafa agado dum tiu ĉi pasinta jardeko.

En tiu ĉi kvazaŭ kronologia memuaro ni parolis ne nur pri atingoj, sed ankaŭ pri problemoj solvendaj. Tamen, la bilanco estas tre favora, kaj nur restas entrepreni kun entuziasmo la venontajn taskojn cele al novaj kaj daŭraj sukcesoj de la Esperanto-movado en Kubo. ☺

INAŬGURITA INTERNACIA ESPERANTO-CENTRO

La unuan de junio eniris en la kuban Esperanto-movadan kiel historia tago, ĉar en belega montara regiono de la provinco Vija Klara, meze de nia lando staras hotelo *Hanabanilla*, kiu de tiam fariĝis Internacia Esperanto-Centro, kie esperantistoj el la tuta mondo povos ĝui Esperanto-etoson, muzikon, seminariojn, filmojn, bibliotekan servon kaj Esperanto-kursojn. Tiucele oni konstruis du klasoĉambrojn, kie ĉiuj vizitantoj interesiĝantaj pri la Internacia Lingvo povos lerni ĝin. La inaŭgura aranĝo okazis kadre de la Deka Turisma Kongreso de Varadero kun la ĉeesto de turismaj reprezentantoj el diversaj landoj. La aranĝo estis organizita flanke de Kuba Instituto pri Turismo (INTUR) kaj KEA, kies reprezentantoj en Vija Klara ludis gravan rolon por finpretigi ĉiujn materialajn kondiĉojn okaze de tiu grava evento. Nia prezidanto Jesús Castillo esprimis emociajn vortojn rilate la gravecon kaj perspektivojn de la Centro.

M. Gutiérrez

ĈE SIDEJO DE TROBADOROJ

La 3an de junio ĉe la Domo de la Trobadoroj en municipo Centro Havano okazis entuziasmiga Esperanto-festo organizita de la loka estraro. Oni manĝis, drinkis kaj kantis en Esperanto dum la etoso fariĝis ege familia. Kompreneble, ili aliras avantaĝan lokon ce la interprovinca konkurado, ĉi-kaze Havano kaj Vija Klara estas bonaj konkurantoj. Ek al venko!

Unua Esperanto Festivalo

La Unua Nacia Festivalo de KEA estas la celo, kiu koncentras en Santa Klara dum tiuj ĉi tagoj, signifan kvanton de nia tutlanda membraro.

Varia programo, kun tre diversa, ĉefe kultura karaktero transformas ĉi-momente tiun urbon en kernon de la kuba esperantista universo. Muziko, deklamado, libroservo, sportaj kaj amuzaj aranĝoj kontribuos, ĉi-foje, plenumi interkonsenton de la Nacia Komitato dum ties lasta kunsido okazinta la 28an kaj 29an de januaro en provinco Kamagvejo.

Tiu ĉi estos nova ebleco por demonstri nian movadan forton kadre de ties Deka Datreveno sojle al la 75a Universala Kongreso.

J. R. Rodríguez

74a UK EN BRAJTONO

Ĝis nun aliĝis pli ol 1500 kongresanoj el ĉirkaŭ 54 landoj, kio estas kontentiga rezulto. Multaj el ili aliĝis ankaŭ al postkongresoj en Irlando, Kimrio kaj Skotlando. Tiu ĉi kongreso estas aparte interesa por la kuba esperantistaro, ĉar tie nia lando sin prezentos kiel gastigonto de la 75a UK 1990.

NUNTEMPE

Moskvo, Soveta Unio
17-23 de aprilo, 1989

22a KONSULTIĜO DE SLEAJ

Pli ol 40 reprezentantoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio (Ĉeĥa kaj Slovaka asocioj), GDR, Hungario, Kubo, Pollando, Vjetnamio, kaj Soveta Unio partoprenis la 22an Konsultiĝon de Esperanto-Asocioj en Socialismaj Landoj, kiun kunorganizis SSOD (Unio de Sovetaj Societoj de Amikeco kaj Kulturaĵoj kun Eksteraj Landoj), Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU) kaj aliaj moskvaj Esperanto-organizaĵoj.

Laŭ invito de antaŭaj konsultiĝoj, ĉeestis ankaŭ Mondpaca Esperantista Movado (MEM) kaj Pola Studenta Esperanto-Komitato (PSEK). Ankaŭ partoprenis delegacio de Universala Esperanto-Asocio, kaj ties Junulara Sekcio, TEJO. Laŭ aparta invito de la organizantoj partoprenis reprezentanto de Komunistista Esperantista Kolektivo (KEK).

La Konsultiĝo, kiu jam 20 jarojn praviĝas utila renkontiĝo, komence estis stabiliga faktoro por la Esperanto-movado, kaj ĉiam ebligis la evoluigon de kunlaboro inter la Esperanto-asocioj en socialismaj landoj.

Dum la laborsesioj, la ĉeestintoj informiĝis pri la aktuala situacio de la movado en la koncernaj landoj, konkretiĝis pluraj kunlaboraj projektoj, kiuj reliefiĝis la daŭre kreskantan kvaliton de la movado en la socialismaj landoj.

A. F. Callenes

FOTOEKSPOZICIO

La 21an de junio la Havana Esperanto-Klubo por Informado (HEKI) inaŭguros fotoekspozicion omaĝe al la Dekjara Jubileo de KEA en la ĉefurba biblioteko *Rubén Martínez Villena* en Malnova Havano. Vizitu ĝin ĝis la 30a de junio kaj konu per fotoj plejparton de nia dekjara historio.

Konkurso "Deka Datreveno"

La Sekretario por Kulturo de KEA, kun la celo diskonigi la rezultojn atingitajn dum dek laborjaroj, kunvokas la konkurson "Deka Datreveno de KEA" por prezenti originalan verkon en Esperanto aŭ hispanlingve, kies enhavo devas resumi la dekjaran ekziston de la asocio.

La bazoj de la konkurso estas jenaj:

- 1.- Ĝin povas partopreni ĉiuj membroj de KEA.
- 2.- Ĉiu aŭtoro povas prezenti tiom da verkoj, kiom li aŭ ŝi konsideru kaj elektos kiun ajn genron.
- 3.- Verkoj povas esti originale en Esperanto aŭ hispanlingve neniam eldonitaj nek parte nek tute.
- 4.- Verkojn oni devas prezenti en originalo kaj du kopioj klare skribitaj je 60 tajpofrapoj po linio kaj 30 linioj po paĝe je du spacoj.
- 5.- Ĉiu verko devas esti minimume dekpaĝa.
- 6.- La aŭtoro devas subskribi sian verkon per pseŭdonimo kaj sendi en aparta koverto la personajn konitaĵojn kongruajn kun la pseŭdonimo.
- 7.- Verkoj ne premiitaj estos resenditaj al la aŭtoro.
- 8.- Oni otorgos unuan premion konsistanta en finsemajna gastigo kun akompananto en la Internacia Esperanto-Centro Hanabanilla; duan premion konsistanta en senpaga aliĝo al la 75a UK en Havano; trian premion konsistanta en interesaj literaturaĵoj kaj aliaj esperantaĵoj. Konkursantoj en hispana lingvo nur rajtas gajni la duan kaj trian premiojn.
- 9.- Limdato por ricevi la verkojn estas la 30an de novembro 1989.
- 10.- La konkursaĵojn oni sendu al la Sekretario por Kulturo, konkurso: "Deka Datreveno", Poŝtkesto 2018, 10200 Havano 2; aŭ porti persone al la CO en Neptuno kaj Industria, Centro Havano.
- 11.- La verkojn juĝos komisiono, kies decido estos neapelaciebla.



Esperanto en Radio

Radio Havano Kubo elsendas en Esperanto! Post iom da revo kaj strebo Kuba Esperanto-Asocio sukcesis interesigi la radio-estaron pri utiligo kaj efiko de Esperanto por radio-elsendoj. Tiu prestiĝa institucio nialanda fariĝis vigla tribunio por Esperanto kaj dank' al amasa reago de la esperantistoj tutmonde, la pasintan 11an de septembro aŭdiĝis nia voĉo tra la etero. Ni komencis ĉiudimanĉan programon dudek-minutan, kiu la 28an de majo plilongiĝis ĝis duonhora.

Se vi interesiĝas pri niaj elsendoj, serĉu en la sekva paĝo niajn frekvencojn kaj horojn; aŭdu ilin kaj sendu viajn opiniojn, sugestojn kaj kritikojn al la Esperanto-redakcio de R.H.K (Poŝtkesto 7026, Havano, Kubo).

REGIONAJ KONGRESOJ

JULIO

10-14 25a Brazila Esperantista
Kongreso
Campo Grande do Sul

20-23 49a Argentina Kongreso
de Esperanto
Temo: *Kiel agadi dum la Dua
Jarcento?*

22-27 Kongreso de Esperanto-
Ligo por Norda Ameriko
Ĉikago

EŬOJ EN BAJAMO

Ja nia komenca esprimo mon-
tras, ke miriga laboro efikas tie.
Temas, parte pri la kuraĝa bul-
teno de la Esperantista klubo
La Eŭo, nomo kiu difinas la
periodaĵon.

Bajama Esperantista Junulara
Organizo (BEJO) strukturigis
kiel klubo nuntempe vigle
funkcianta kaj meritas ĉies
atenton kaj helpon por an-
taŭnenigi sian publikigaĵon kaj
utiligi ĝin kiel ligilon inter niaj
junaj esperantistoj.

Ni deziras al ili sukceson kaj
daŭran *reeŝon* tra la tuta insulo.

Bulgario: En la ĉefurbo Sofio
ekzistas 15 lokaj kluboj, por
helpi kies agadon la Centra
E-Domo de Kulturo komen-
cis eldoni broŝurserion Es-
peranta Estrado. En ĝi aper-
os tradukitaj kaj originalaj,
presitaj kaj ne aperintaj
teatraĵetoj, skeĉoj, kantoj,
humuraĵoj, ktp. Kunla-
boremuloj skribu al Espe-
ranta Estrado, Pk. 45, BG
1090 Sofio.

Oni ankaŭ provas revivigi la ia-
majn E-elsendojn de *Radio
Sofia*. Apogojn sendu al *Ra-
dio Sofia*, blvd. Dragan
Cankov 4, BG-1000 Sofio.

RADIO HAVANO KUBO

ESPERANTO-REDAKCIO


Poŝtfako 7026

Havano, Kubo

Ĉiŝidimanĉe


UTC	Horo	HAV	Frekv. (kHz)	Ondo-longo (m)	Regiono	
0800-0820		0400-0420	11 835	25	Okcidenta Norda Ameriko kaj Pacifika Azio	
1700-1730		1300-1330	17 750	16	Norda, Meza kaj Suda Ameriko	
			15 155	19		
			15 340	19		
			11 725	25		
			11 760	25		
			11 815	25		
			9 550	31		
			17 800	16		Eŭropo kaj Mediteranea regiono
			15 285	19		
11 800	25					
2200-2220		1800-1820	17 800	16	Eŭropo kaj Mediteranea regiono	
			15 285	19		
2230-2300		1830-1900	11 910	25	Norda, Meza kaj Suda Ameriko	
			11 950	25		
			11 970	25		
			6 060	49		

Redaktoroj: Maritza Gutiérrez kaj Orlando Raola (KEA)
Kunordiganto: Humberto Casanova (RHK)



- 1 manĝo-tablo
- 2 tablo-tuko [Damaska tuko]
- 3-12 servico* por unu persono
- 3 suba telero
- 4 plata telero
- 5 profunda telero (supo-telero)
- 6 deserto-telero
- 7 tranĉilo kaj forko
- 8 fiŝ-tranĉilo kaj forko
- 9 buŝ-tuko
- 10 buŝ-tuk-ringo
- 11 tranĉil-benketo
- 12 vin-glasoj
- 13 nom-karto (tablo-karteto)
- 14 sup-ĉerpilo (sup-kulerego)
- 15 supujo
- 16 duobia kandelingo
- 17 saŭcujo
- 18 saŭco-ĉerpilo
- 19 tablo-ornamaĵo
- 20 pan-korbeto
- 21 bulko

- 22 pan-tranĉaĵo
- 23 salatujo (salat-pelvo)
- 24 salat-forko kaj salat-kulero
- 25 legomujo
- 26 rostaj-plado (viando-plado)
- 27 rostaĵo
- 28 kompotujo
- 29 kompotujeto
- 30 kompoto
- 31 terpomujo



- 32 servo-ĉareto
- 33 legom-plado
- 34 rost-pano (toasto**)
- 35 fromaĝo-plado
- 36 buterujo
- 37 garnita pan-tranĉo
- 38 pan-garnaĵo
- 39 sandviĉo
- 40 fruktujo
- 41 migdaloj
- 42 boteloj kun vinagro kaj oleo
- 43 tomata saŭco (keĉupo***)
- 44 servo-ŝranko (kredenco**)
- 45 elektra teler-varmigilo
- 46 kork-tirilo
- 47 ĉapet-for-igilo
- 48 likvor-karafo
- 49 nukso-rompilo
- 50 tranĉilo
- 51 tranĉil-tenilo
- 52 klingo-ankro

- 53 tenil-ringo
- 54 ringo
- 55 klingo-ŝultro
- 56 klingo-dorso
- 57 tranĉ-rando
- 58 forko
- 59 fork-tenilo
- 60 fork-dento
- 61 sup-kulero
- 62 kuler-tenilo
- 63 kuler-kavo
- 64 fiŝ-tranĉilo
- 65 fiŝ-forko
- 66 kulereto (desert-kulereto)
- 67 salat-kulero
- 68 salat-forko
- 69 kaj 70 distranĉa kompleto
- 69 viando-tranĉilo

- 70 viando-forko
- 71 frukto-tranĉilo
- 72 fromaĝo-tranĉilo
- 73 buter-tranĉilo
- 74 legom-kulero
- 75 terpom-kulero
- 76 sandviĉ-forko
- 77 asperago-trulo
- 78 sardin-forketo
- 79 omar-forko
- 80 ostro-forko
- 81 kaviar-tranĉilo
- 82 glaso por blanka vino
- 83 glaso por ruĝa vino
- 84 glaso por dolĉa vino
- 85 kaj 86 ĉampan-glasoj
- 87 pokalo
- 88 konjak-glaso
- 89 likvor-glaso
- 90 brando-glaso
- 91 bier-glaso

Simboloj

[] entenas klarigojn kaj aproksimajn pronoc-indikojn

* indikas vort-radikon, kiu aperis en PV, sed kies difino estis iom sanĝita au plivastigita en PIV, tiel ke ĝi taŭgas por nomi la desegnitajn nocion.

** indikas vort-radikon ne troveblan en PV kaj ĝia suplemento, sed troveblan en PIV.

*** indikas vort-radikon, kiu troviĝas nek en PV nek en PIV. Oni uzu tiujn vortojn nur kun aldonita difino aŭ klarigo.

TOSTO POR ZONZO

Onelio Jorge Cardoso*

(tr. el la hispana: Maritza Gutiérrez)

Kun ies permeso, mi venas ĉi tien drinki por Zonzo. Mi ja scias, ke tiu ĉi startrinkejo estas por deculoj nur, sed delonge mi diris al mi; iun tagon, eble, mi eniros tien, subite, kaj kiam oni tion rimarku mi jam havos ĉe-mane plenan glason kaj Zonzo estos apud mi konversaciante, ambaŭ mortaj je rido. Tamen, vidu, Zonzo ja mortas kaj mi venis sola tosti por li.


Ĉi-matene malmultaj personoj ĉeestis lian sepulton. Se mi dirus, ke ni estis dek aŭ dek du, mi multon diras. Mi kredas, ke alvenis al la terkavo nur la Strabulo, Romano kaj mi. Sed tio ne gravas, ĉu? Tio ne estas afero via, ĉu vero doktoro?

Nu, sed ne pensu, ke mi parolas ĉar mi petas permeson por tosti. Mi celebras mian dumvivan pugnobatalon kune kun amiko, kiu certe valoris sian ostarlongon. Tial mi tostas, kaj eĉ pro la ĉa-greno kaŭzita de ĉies malĉeesto hodiaŭa por meti kvar florojn sur lian terpecon, ĉar neniu devus trapiasi tiun vojon nesciante, ke sube iu kristano dormas, ĉar eble li dormas, aŭ ebrias ankoraŭ, sed ĉiel li restas nekontenta pro la vivo, kiun oni lasis por li ĉi-tie. Ĉu vero, doktoro?

Kompreneble, kelkaj konsideris lin morta de antaŭ longa tempo; ekde lia povra naskiĝo, ĉar povrulo kia li estis, neniam sukcesas vivi malgraŭ tiom da enspirita vento. Nu, Periko, plenigu mian glason, ĉar mi plu parolos! Do, doktoro, kion vi sciis pri Zonzo? Ĉu, ke li loĝis sube tie en ligna domaĉo en la plaĝo? Eble eĉ tion vi ne sciis, ĉar tien vizitadis nur mi, kiam laborloko aperis por ne pli ol tri viroj. Diru al mi, kion pli vi sciis? Ĉu, ke li ebriiĝemis kaj la knaboj kriadis al li surstrate, same kiel eĉ plenaĝuloj tion faris? Ĉiuj konas tion. Ĉu, ke li ĉiam estis malpura, piednuda kaj vestaĵ-ŝirita? Tion ĉiuj konas. Ĉu, ke li scipovis nek legi, nek skribi? Ankaŭ tion ĉiuj konas. Sciate estas, ke li ŝatis drinki kiel frenezulo kaj ĉiam tutfalis sur teren kiel hundo. Eĉ Dio tion sciis, sed ĉiam rifuzis alrigardi ĉi suben al Cojimar! Nu, doktoro, oni devas scii kial li ebriiĝemis, sed eĉ ne tion. Oni devas retroirigi la tempon, monatojn, jarojn, kaj komenci kiam vi abiturientis kaj Zonzo estis unu plia fiŝkaptisto inter ni. Tiam li estis cirkaŭ 25-jaraĝa. Do, kiel dirite li estis dors-bruste sana viro, kaj ne ekzistis por li laciga laboro, nek malfrua rido, nek drinkemo. Ĉu vi scias kiom da jaroj jam pasis? Nu, pliigu aliajn dudek kaj restu aŭskultante por vidi ĉu vi povas kredi.

Ĉu vi ne scias, ke tie, kie Fileno starigis sian kelon fierigan- laŭ onidiroj de ĉiuj ĉi-tieaj stultaj loĝantoj- ekzistis dometo kun granda ĝardeno antaŭe, kaj ke tiu dometo, tiu ĝardeno kaj la virino tie loĝanta apartenis al Zonzo? Ĉu vi sciis tion? Kiel scii tion, se vi alvenis poste! Nu, aŭdu nun! Tiuj malmultaj metroj de tereno, kie troviĝis la dometo kaj la ĝardeno apartenis al Zonzo, ĉar li heredis ĝin de iu familiano. Poste li enamiĝis, sed antaŭ ol edziĝi kiel ĉiu legama homo, li pensis unue hejmon doni al la futura edzino. Sed por li, homo vivinta dank' al siaj fiŝaĉoj, konstrui domon estis kvazaŭ aspiri doktoriĝi, Ĉu vi komprenas? Tamen li faris ĝin. En tiu epoko li ne drinkis, kaj malkovris, ke kiam la botego forjetas eksteren la Havanan balaafon, ofte restas flosaĵoj, inter ili bona ligno. Post tra-

nokta fiŝkaptado, li eliris en sia "ŝipeto" por alporti lignon. Ĉu vi farus tion, doktoro? Kaj mi diros tuj ion pli, ĉar tiaj aferoj ŝajnas infanecaj, tamen apartenas al viroj. Sciuj, ke en la balaaĵo aperas "mirakloj" por la malriĉuloj, eĉ pomoj, duonbonaj, duonmalbonaj kaj ankaŭ tute bonaj. Tio kutime okazas en Decembro post la nokto de 1^a 24a. Nu, Zonzo emis kapti ilin, doktoro, li kaptis ilin de la riĉa forbalaaĵo flosanta sur la maro. Ankaŭ oranĝojn kaj eĉ fromaĝon. Iam - kaj tion mi nomas infaneca ŝajno, tamen vira - li kaptis rompitan pupon, kiun poste li ekflikis kaj lasis kvazaŭ nova kun du vitraj butonoj kudritaj sur la okul-lokoj. Ĉu vi konas la kriplan knabinon? Ĉu tiu, kiu estas la plej aĝa filino de Roman? Do, se vi irus suben rekten al la plaĝo, vi renkontus ŝin rigardantan la maron. El la tri knabinoj, mi parolas pri tiu nekreskiĝinta. Iru, konu ŝin kaj vidu ŝian pupon, kaj petu al ili rakonti pri la pomoj kaj oranĝoj kaptitaj de Zonzo, kiu ne menciis la devenon. Viro tia, minimume ne meritas senfloran enterigon.



Periko, ne estu poltrona, plenplenigu tiun ĉi glason!

Sed ni reiru al la temo, mi diris, ke Zonzo ekprenis la lignon el la maro. Nu, sed li ne pagos ĉarpentiston, ĉu vero? Mono ne estis, ĉu? Ho!, sed malriĉulo fidus tiujn problemojn al 1^a tempo, kaj same kiel vi kalkulas: "por 4 malsanuloj mi profitos entute 40 pesojn", la malriĉulo analizas: "en 4 jaroj, eble mi konstruos mian domon", kaj komencas labori kaj fariĝas ĉarpentisto, se estus necese, ĉar malriĉulo estas la ilo. Ĉu vi komprenas, doktoro? Kaj finkonstruas sian hejmon kiel faris Zonzo, kiu eĉ por defendi la domon de la norda vento kalfatris ĝin kvazaŭ ŝipo. Tiel pasis longega tempo, kaj bone-nebone li havis sian domon, kaj tiam aperis Fileno! Ĉu diskuti? Tion li ne faris. Sed kiam oni iris minaci lin - nur dank' al la virino, kiu sin intermetis dum la infanoj ploris - li mortigis nenion tiunokte. Oni forportis lin unue kaj poste forpelis la familion kun ties meblaĉoj. Kies helpon peti? Ĉu ekzistis cirkaŭe juristo kun iom da necesa hontemo?

Periko, vi ja scias tion, ĉar jam delonge vi elĉerpis vian malicon pro tiom longa ĉi-tiea logado!

Do, laŭ la tempo pasis, kompreneble, la edzino ekhavis kelkajn aspirojn kaŭze de tiuj aferoj: ne sufiĉas pano, medicino, vestaĵoj, ŝuoj. Konklude, si apartiĝis kune kun la filoj. Ĉu vi pensas, ke tio igis lin drinkulo? Ne tiel, doktoro! Neniu fariĝas tia sen kaŭzo, kvazaŭ dirante: iun tagon mi alkrociĝos al botel-buŝo". Ĉiam tio havas sian pravigaĵon, ĉar lia drinkemo ekestis poste, kiel mallacigilo por la korpo. Okazis kiam li eklaboris en la domo de la vidvino de Alkantara, kiu laŭ onidiroj malaperis, kaj Dio tenu sin ne je 90, sed je mil mejloj fore. Kiel sciante, ŝi posedis dudek kelke da domoj ĉi-tie... ŝi posedis! Ĉu vi scias kiu fosis la teron de la domo per nudaj manoj? Kompreneble, Zonzo! Aŭskultu doktoro, ĉu vi iam kavigis en via doma korto? Ĉu ne? Faru tion per pioĉo, kiel provo nur. Apenaŭ vi senseligu la teron estiĝos solida ŝtono, ĉar ĉio kio subteras tie estas "roka hund-dento" kompakta kaj oni devas fosi ĝin disŝirante la animon. Nu, demetu vian ĉapelon por pensi pri Zonzo! Kvardek aŭ sesdek centavojn, maksimume unu peson li ricevis, kaj la tutan tagon ene de la kavo kun la suno surdorse, pikante la ŝtonon; eĉ al ĝi li parolis poste, aĉulo! Mirakle li ne pli enprofundigis la kavon por malaperi de tiu ĉi mondoparto kaj reaperi en Ĉinio por taksi ĉu eble ĉinoj estis pli bonaj. Do, li sola faris pli ol 20 fosaĵojn, kaj post tiu senhoma laboro nur stultulo ne drinkus iomete ĉiuvespere por mildigi la korpon. Sed, kiu inventis tion? Ĉu ni, aŭ Fileno kaj la vidvino? Ĉar eble vi diros, ke ni inventis tion pro nia ne enskribiĝo en la universitato, nur tio mankas.

Nu, doktoro, tion vi ne diru, ĉu vi scias kial?... kolerigas min pensi, ke ĉi-matene akompanis lin nur la Strabulo, Roman kaj mi, kaj se iam la kripla filino de Roman restis plorante tio okazis hieraŭ vespere. Sed krom tio, pli kolerigas min scii, ke vi rifuzis atenti Zonzo-n pasintsemajne; ĉar kiu flegas viron tian en kies domaĉo nur ekzistas aro da malplenaj rum-boteloj? Ne doktoro, ne



malfermu vian buŝon, pli bone pensu malaperi same kiel la vidvino kaj Fileno faris; kaj vi, Periko, ni atendu kiom da tempo ankoraŭ daŭros tiu ĉi startrinkejo por deculoj. Mi venis ĉi tien nur tosti por Zonzo.

Novembro 1960

** Onelio Jorge Cardoso (1914-1986) estis eminenta rakontisto, kiu verkis eksterordinarajn raportojn pri la kuba kamparano. Li ricevis diversajn premiojn pro siaj rakont-libroj. Lian verkaron oni tradukis al pluraj lingvoj. Oni konsideras lin kiel unu el la plej elstaraj popolarakontistoj de Latinameriko. ☺*

Detlev Blanke (GDR)

1. La estonteco de Esperanto dependas de objektivaj kaj subjektivaj faktoroj:

- 1.1. Al la *objektivaj faktoroj* apartenas i.a.:
- a) la kreskanta bezono de pli racia kaj pli demokratia internacia lingva komunikado;
 - b) la direkto de la monda politika evoluo, ebliganta tendence pli demokratian reguligon de la internaciaj rilatoj;
 - c) la konkreta politika, ekonomia kaj lingvopolitika situacio de difinita teritorio, kie agadas la Esperanto-movado;
 - ĉ) la lingva kvalito de Esperanto (kiu pruviĝis sufiĉa por la rolo de internacia komunikilo).

- 1.2. Al la *subjektivaj faktoroj* apartenas, i.a.:
- a) la ĝenerala nivelo de la internacia Esperanto-movado (inkluzive de la landaj movadoj), kvante kaj kvalite, kiu inkludas la kapablojn aŭ malkapablojn de la gvidaj aktivuloj de la movado;
 - b) la kapablo de la movado sin efike (aŭ malefike) prezenti eksteren (antaŭ politikaj, sciencaj aŭ aliaj rondo);
 - c) la strategia kompreno de la movado pri la dialektika unueco de teoria esploro kaj prezento pri Esperanto kaj la praktika apliko de la lingvo;
 - ĉ) la subjektiva sinteno (pozitiva aŭ negativa) de difinitaj politikaj influhavaj personoj.

Kompreneble ĉiuj faktoroj en la du grupoj estas iel ligitaj kaj sin parte kondiĉigas reciproke.

2. Konkretajn decidojn pri iuj paŝoj rilate la lingvopolitikon en iu lando aŭ regiono tre forte influas politikaj kaj ekonomiaj potencoj. Ili, do la ŝtato, partioj, industriaj instancoj aŭ internaciaj organizaĵoj nepre konsultos antaŭ siaj decidoj la sciencistojn. Tio ankaŭ validas por la problemo de la disvastigo aŭ (estonte eventuale) enkonduko de internacia planlingvo en difinitajn sferojn de la internacia komunikado. Se la objektivaj faktoroj favori

-gus aŭ eĉ necesigus seriozan okupiĝon pri la mildigo aŭ solvo de la internacia lingvokomunikada problemoj, kaj la sciencistoj havas ekz. pri Esperanto opinion aŭ vidpunkton, kiu ne kongruas kun la faktoj, la solvopropoj plej verŝajne ignoros la multjardekajn spertojn, pri kiuj disponas la Esperanto-komunumo. Partaj nuntempaj atingoj en kelkaj landoj, kie la atentinda sukceso de Esperanto ne nepre estas sekvo de la pozitiva sinteno de sciencistoj kaj ne nepre baziĝas sur seriozaj sciencaj esploroj kaj ekspertizoj, ne trompu nin.

Sub certaj historiaj kondiĉoj kaj la efiko de favoraj subjektivaj faktoroj tio eblas. Tamen, por atingi daŭran kaj stabilan sukceson nepre necesas la subteno de la sciencistoj, de la altlernejoj kaj universitatoj, de la sciencaj akademioj kaj lingvistikaj institutoj.

Pri tio la plej multaj landaj Esperanto-asocioj ne konscias. Mankas en la plej multaj landoj kondiĉoj por scienca prezento de Esperanto.

3. Kion signifas "scienca prezento de Esperanto?" Oni devas distingi tri problemarojn:

3.1. Necesas la scienca esploro kaj prezento de la internacia lingva problemoj kun ĉiuj siaj aspektoj (politika, ekonomia, lingvistika, jura, psikologia, informadteoria, pedagogia, k.a.). Do ne Esperanto, sed la lingva problemoj estas en la centro de la atento.

Kiam en 1969 Ivo Lapenna fondis la antaŭulon de la nuntempa revuo *Language Problems & Language Planning*, li nomis ĝin *La Monda Lingvo-Problemo* (eldonita de Mouton, Den Haag, ĝis 1977). Sur la kovrilo oni trovis kelkajn de tiuj aspektoj menciitaj, nome, "socia, lingvistika, politika, jura, psikologia, ekonomia". Laŭ mia koncepto ĉio ĉi estas la objekto de interlingvistiko.

Oni havas pli da ŝancoj trovi intereson pri planlingvoj ĝenerale, kaj aparte pri Esperanto, se oni konsiliĝas pri la ekzisto de tutmonda lingvokomunikada problemoj. Multaj homoj,

ankaŭ sciencistoj, simple kontestas la ekziston de tiu problemo. Laŭ ilia simplisma kompreno la angla solvis la problemon. Pri tiu problemaro ekzistas jam abunda literaturo, kvankam sufiĉe heterogena kaj dissemita.²

3.2. La dua problemgrupo koncernas la fenomenon de laŭplane, konscie kreita lingvo, do *planlingvo*. Necesas montri, ke tia lingvo povas ekzisti kaj funkcii. Oni povas science priskribi la diversajn provojn, klasifiki ilin kaj diskuti pri la ecoj de tia planlingvo aŭ eĉ prezenti novajn sistemojn. Ekzistas abunda literaturo. Oni povas diri, ke pri tiu problemaro okupiĝas subdisciplino de la interlingvistiko, la planlingvistiko. Por iuj aŭtoroj ĝuste ĉi-tiu problemaro estas la vera objekto de interlingvistiko.

3.3. Kaj nur la tria problemgrupo koncernas la sole funkciantan planlingvon: Esperanto. Se oni esploras la fontojn, strukturon, evoluon kaj komunikkapablojn (praktika apliko) de Esperanto, ĉiam en kunteksto kun ĝia parolantaro, oni okupiĝas pri esperantologio.³

3.4. Sciencstrategie pruvigis taŭga la aliro al la triopo: monda lingvo-problemo -> planlingvoj -> Esperanto. Sed ankaŭ eblas procedi alimaniere.

Oni ankaŭ povas eliri de la lingvistike ne ignorebla fakto, ke ekzistas funkcianta planlingvo. Oni do esploras la diversajn demandojn kaj problemojn, kiujn tiu fenomeno devigas rekonii. Tiam, almenaŭ provizore, forfalas 3.1.

Al la interesaj aspektoj apartenas i.a.:

- la fenomeno de la konscia interveno de la homo en la lingvoevoluan (lingvoplanado).
- tipologio de planlingvoj kiel spegulo de semiotikaj kaj lingvistikaj skoloj kaj tendencoj.
- praktika valoro de la aplikata planlingvo (= Esperanto).
- klerigaj kaj edukaj valoroj de Esperanto (i.a. la propedeŭtika aspekto por la lernado de fremdlingvoj, la valoro de Esperanto por la Internacia popola amikeco, internaciismo, k.s.)
- valoro de planlingvoj ĝenerale kaj de Esperanto aparte por la ĝenerala lingvoscienco.

Fakte en GDR ni komencis kun 3.2.-3.3. kaj nun aldonos 3.1.

Unue aperis disertacio, kiu montris la funkciopablon de Esperanto⁴, poste sekvis libro pri la tuta problemaro de planlingvoj⁵.

4. Oni povus demandi sin, kiu stimulu la esploradojn pri interlingvistiko kaj esperantologio (laŭ la sencoj 3.1.-3.3.) en landa skalo. Verŝajne la landaj asocioj devus fari la komencon. Tio ŝajnas unuarigarde neeble. En multaj landoj mankas interesitaj kaj engaĝiĝemaj (pri la temoj) lingvistoj, ĝenerale pro tio, ĉar ili ne konas seriozajn publikacojn. Kaj ĉar tiuj ofte mankas, ne interesiĝas lingvistoj. Kaj ĉar mankas interesiĝantaj lingvistoj, ne aperos publikacoj kaj aliaj aktivecoj. Do senelira cirklo? Tia situacio ne favorigas la kondukon de Esperanto en la terenojn aŭ universitatojn, tenas la interesiĝon de la amasmedioj je relative malalta nivelo, ne faciligas la aliron al ministerioj kaj aliaj ŝtataj organoj. Sed la impulsoj por tarompi la cirklon devas veni el la intelektuaj rondoj de la landaj asocioj.

Sekvas kelkaj organizaj paŝoj, kiuj funkcias almenaŭ en GDR. En aliaj landoj, laŭ aliaj kondiĉoj, ekzemple en Hungario aŭ en Soveta Unio, necesis aliaj paŝoj, aŭ nur parte similaj. La paŝoj parte okazas paralele, parte sekvas unu la alian.

4.1. Se en difinita lando nenio ekzistas pri interlingvistiko/esperantologio, kaj oni devus komenci ĉe nulo, estus konsilinde unue starigi arkivon kun la bazaj materialoj (riceveblaj plej parte ĉe UEA), por ke oni povu montri fakverkojn al eble interesigeblaj lingvistoj aŭ helpi al trovotaj junaj studentoj enprofundiĝi en la temaron.

En GDR, feliĉe, ekzistas jenaj grandaj kolektoj: ŝtata biblioteko en Berlino kun ĉirkaŭ 3000 titoloj, arkiva biblioteko de GDREA kun ĉ. 2500, privata kolekto de la aŭtoro kun eble 4000 kaj eble pluaj 1000 titoloj en kelkaj universitataj kaj regionaj centraj bibliotekoj (ekz. *Sächsische Landesbücherei Dresden*,

Deutsche Bücherei Leipzig). Tiuj materialoj estas por seriozaj sciencaj studentoj principe alireblaj.

Tre grava estas la kompilado de Centra Katalogo, kiu listigu tion, kio ekzistas en simil-specaj publikaj bibliotekoj. Tio ofte estas pli multe ol supozite.

La landa asocio (LA) povus helpi per bibliografiaj informoj pri nove aperintaj titoloj, kiuj estas publikigeblaj en la organo de la LA.

4.2. Se al LA tute mankas sperto, kiel procedi, ĝi povus inviti specialiston pri interlingvistiko el la eksterlando por mem informiĝi pri la problemoj kaj/aŭ organizi prelegojn en universitatoj. Tiel eble iuj sciencistoj interesiĝus pri la problemoj kaj povus fariĝi valoraj stimulantoj kaj subtenantoj realige al la sekvaj paŝoj.

4.3. Kvankam okazas, ke reputaciaj sciencistoj pretas helpi al la enlanda starigo de interlingvistikaj aktivecoj -pro jam longe ekzistanta simpatio aŭ vekita interesiĝo- oni ne atendu de ili multajn konkretajn kontribuojn, ilia faka profilo ĝenerale jam estas fiksita. Tamen, ili povus helpi, ke *juna*j studentoj aŭ doktoriĝemaj sciencistoj interesiĝu pri la problemaro. Ili povus starigi utilajn kontaktojn al la redakcioj de fakaj ĵurnaloj, disdoni temojn por diplomlaboraĵoj, por magistrigaj aŭ doktoriĝaj disertaĵoj. Kaj ili povus ekspertizi tiujn disertaĵojn. En GDR multe helpis ekde 1970 la slavisto Viktor Falkenhahn kaj ekde 1978 la multflanka lingvisto Georg Friedrich Meier, kiu redaktis la gvidan lingvistikan revuon en GDR.

4.4. Necesas, do, trovi edukeblan, specialistigeban junul(in)on, kiu fariĝu paŝon post paŝo specialisto, kapabla kontakti la profesion lingvistikan mondon.

4.5. Paralele al tio estas konvene, formi iun sciencan kolektivon. En 1970 fondiĝis en GDR la fakgrupo Interlingvistiko / Esperantologio en Kulturligo, kiun gvidis prof. d-ro Viktor Falkenhahn de Humboldt-Universitato. La fakgrupo ekzistas ĝis hodiaŭ, sed ŝanĝis sian agadprofilon. Dum la unuaj jaroj tiu kolektivo povas servi al la klerigo kaj scienca trejniĝo de siaj membroj (lingvistoj, pedagogoj, historiistoj, k.a., ĉiuj fakte esperantistoj). Iom post iom la fakgrupo estas tiom matura, ke ĝi povas prezenti prelegojn antaŭ interesitaj randoj, organizi seminariojn tiel alirante simpatiantajn sciencistojn ekster la Esperanto-movado.

4.6. Necesas, plue, publikigi studojn pri interlingvistikaj/esperantologiaj temoj en nacilingvaj fakaj ĵurnaloj (lingvistiko). La kontaktoj akiritaj sub 4.3./4.5. helpos. La studoj ne estu periferitemaj kaj ne tro specifaj. Ili estu super-

rigardaj, kun riĉaj literaturindikoj. La studojn verkas la nove edukitaj specialistoj aŭ la simpatiantaj profesiaj lingvistoj. Ili estas tre gravaj, ĉar informos pri nova scienca branĉo kaj konatigas la fakliteraturon jam sufiĉe riĉan, sed ja ĝenerale nekonatan.

En GDR aperis inter 1949-1987 entute 78 germanlingvaj interlingvistikaj/esperantologiaj materialoj de 33 diversaj aŭtoroj. Tio estas 40 studoj, 17 recenzoj, 12 konferencraportoj, 2 diplomlaboraĵoj, 2 doktoriĝaj disertaĵoj, 5 monografiaj. Inter 1949-1969 tamen tio nur estis 6 materialoj de 6 aŭtoroj. 92,3 % de la tuta materialo aperis inter 1970-1987, t.e. 72 materialoj de 30 aŭtoroj, aparte multe en *Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationswissenschaft*, (Revuo por fonetiko, lingvistiko kaj komunikadoscienca), eldonata de la Akademio de Sciencoj. (Al tio aldoniĝas la sciencnivelaj esperantlingvaj materialoj).

4.7. Tre gravas, certigi la enigon de la informoj pri aperintaj materialoj en la nacilingvaj bibliografiaj servojn, en leksikonojn kaj manlibrojn. Tiujn materialojn unue rigardas la nove interesitoj.

En GDR ĉiujare aperas germanlingva lingvistika bibliografia servo. Ĝin eldonas la dokumentado de la Centra Lingvistika Instituto de la Akademio. En la kajeroj ĉiujare aperas sub la rubriko *planlingvoj* pli ol 30 bibliografiaj indikoj pri artikoloj, studoj, monografiaj aperintaj en GDR (de GDR-aj aŭ alilandaj interlingvistoj) kaj de GDR-interlingvistoj en alilandaj revuoj. Tio inkludas esperantlingvajn materialojn (kun tradukita germana titolo). Do, lingvisto kiu volas orientiĝi, trovas abundan materialon.

Kaj, se li estas prudenta, li unue iom konatiĝos kun la fakliteraturo anstataŭ verki facilanime ion neseriozan.

4.8. Se la fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio jam akiris certan reputacion kaj disponas pri kelkaj prelegokapablaj fakuloj, ĝi povas organizi seminarion aŭ kolokvon. La kolokvo unue havu superrigardan karakteron pri la ĉefaj problemoj de interlingvistiko/esperantologio. Oni invitu konatajn fakulojn de la lando kaj petu ankaŭ iliajn prelegojn. Certe troviĝos interesitoj. Utile estus trovi kuninvitanton, ekz. profesoron de la universitato aŭ de la Akademio. Taktike ne estus bone, se la Esperanto-Asocio mem invitus al

la kolokvo. Tio eble ŝajnas al ne nur kelkaj sciencistoj neserioza entrepreno. Do, la fakgrupo (aŭ Societo aŭ io simila), estu almenaŭ formale sendependa de la landa asocio. Tamen, dependas de la konkretaj cirkonstancoj. En 1987 okazis en Tatranská Lomnica (CSSR, Slovakio) interlingvistika seminario, kiun organizis Slovaka Esperanto-Asocio kune kun la Ĉefa. Ĝi fariĝis sukcesa, ĉar la organizintoj kapablis allogi jam en la prepara fazo konatajn lingvistojn. Ili antaŭe dissendis la presitajn tezojn pri la prelegoj de la varbitaj prelegontoj al interesigeblaj institucioj. Krome, ili invitis kelkajn eksterlandaj interlingvistojn kiel prelegantojn. La seminario fariĝis tre sukcesa, sendube starta punkto por la evoluado de interlingvistiko, aparte en Slovakio.⁸

En GDR ekde 1979 ĉiujare (kun escepto de 1987) okazas interlingvistikaj seminarioj en Ahrenshoop (ripozloko ĉe Balta Maro, norde de GDR). La 8-a okazis en 1986. Partoprenas ĉirkaŭ 30-35 profesiaj lingvistoj kaj 4-6 interlingvistoj, por garanti la fakan alirebla por esperantistoj, por garanti la fakan nivelon kaj atmosferon. Dum la tri plenaj tagoj oni aŭskultas 14-18 prelegojn, la duonon de la neinterlingvistoj. Okazas ofte larĝa diskuto pri principaj lingvistikaj demandoj, al kiuj la interlingvistoj aldonas sian vidpunkton. Ĉiujfoje la partoprenantoj havas la eblecon rigardi ĉ. 150 titolojn de faka literaturo. Tiujn ĝis nun 8 seminariojn partoprenis ĉ. 130 diversaj profesiaj lingvistoj de 22 universitatoj kaj altlernejoj, 3 akademioj kaj de unu eldonejo.⁹

La seminarioj jam fariĝis certgrade institucio. Ili helpis malkonstrui antaŭjuĝojn, intersigi la lingvistojn klarigi interlingvistojn pri ĝeneralaj kaj specifaj lingvistikaj problemoj. La partoprenintaj lingvistoj fariĝis pretaj por helpi al la disvastigo de interlingvistikaj aktivecoj, mem publikigis studojn aŭ raportojn pri la seminario, prelegis antaŭ kolegoj kaj studentoj, invitis la interlingvistojn prelegi, k.s. Nun ne estas malfacile trovi ekspertizantojn por doktorigaj disertacioj aŭ por publikigitaj libroj aŭ studoj. Similaj naciilingvaj simpozioj kun la kadra temo *Problemoj de la Internacia Lingva Komunikado* okazas en Łodz (Pollando) sub gvido de T. Ejsmont.¹⁰

4.9. Se la landa asocio okazigas altnivelan internacian seminaron (ekz. pri problemoj de la faka apliko de Esperanto aŭ medicina konferenco aŭ simile) oni invitu lingvistojn al

difinitaj aranĝoj, por ke ili spertu la funkciadon de la lingvo.

Tio ofte pli impresas ol kelkaj prelegoj. Cetere, ne estas klare, kial ne reguje okazu interlingvistikaj kolokvoj por naciaj lingvistoj, lige al la okazantaj Universalaj Kongresoj. Sed, tia kolokvo devas esti tre zorge preparata.

5. Certaj sekvoj de la supre realigitaj paŝoj povas esti diversaj:

5.1. La fakgrupo aŭ difinitaj specialistoj estas akceptataj kiel fakaj partneroj. Se temas pri ekspertizoj, peto je kunlaboro por nacia enciklopedio aŭ aliaj manlibroj, oni sin turnos al tiaj specialistoj.

Se necesas reagoj al neĝustaj prezentoj en fakaj materialoj, la fakgrupo kun siaj specialistoj havas la ŝancon esti aŭskultataj.

5.2. Se okazos internaciaj lingvistikaj kongresoj en la lando, ne estas malfacile prezenti kontribuojn. Tio pruviĝis en 1987 en GDR, kiam okazis la 14-a Internacia Kongreso de Lingvistoj¹¹ kaj dum majo 1988, kiam en Berlin estis internacia tradukologia konferenco.

5.3. La ministerioj por altlernejoj aŭ scienco (dependas de la lando) aŭ pri klerigado havas fakan kompetentularon, kiu gravas ĉe diversaj decidoj, ekz. se temas pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn aŭ universitatojn. Tio ankaŭ validas por eventuala enigo de la fako interlingvistiko en universitaton.

Unuavice pro la aktivecoj resumitaj sub 4.1.-4.9 en GDR ekde 1986 komenciĝis la unuaj Esperanto-kursoj en altlernejoj kaj instaligis docenteco pri interlingvistiko en Humboldt-Universitato.

Tamen, kiel jam menciite supre, la instalo de Esperanto-lektoratoj, ekz. en Pollando kaj Bulgario tute ne bezonis la ĉi-tie menciitajn paŝojn. La landaj kondiĉoj estas aliaj ol en GDR, kie ne eblis fari ion ĉi-rilatan sen la menciitaj paŝoj.

6. Kie estas la loko de UEA ĉe la disvastigo de interlingvistikaj/esperantologiaj aktivecoj sur landa nivelo?

a) Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, (institucio de UEA, povus kaj devus doni sisteman helpon al la asocioj, ekz. patronante diversajn aranĝojn, helpante per konsiloj kaj materialoj. Tre grava estas pli bone organizenda kontakto inter la simile agantoj. Bonan servon donas **Informilo por Interlingvistoj (IPI)**, kiun CED eldonas helpe de la Akademia Centro Interlingvistika en Varsovio.

b) La riĉa libroservo de UEA, la kopiejo, la biblioteko Hodler kaj diversaj eldonaĵoj kiel la serio de la **Esperanto-dokumentaĵoj** estas grava materialbazo. Estus bone, se en la revuo **Esperanto** aperus pli da informoj pri novaj nacilingvaj kaj esperantaj fakmaterialoj, ĉar IPI ne aperos tiom ofte. Nepre UEA akcelu kaj subtenu la publikigon de manlibroj kaj superrigardaj materialoj (Enciklopedio de Esperanto, katalogoj, bibliografioj).

c) La esperantologiaj konferencoj kaj aliaj aranĝoj dum la Universalaj Kongresoj i.a. devus fariĝi spertintersaĝe ankaŭ pri la ĉi-artikola problemaro. Pro tio dum la 73a UK en Rotterdam aperis la propono, ke la 12a Esperantologia Konferenco 1989 en Brighton havu la kadran temon *Studoj kaj esploroj pri Esperanto. Metodologiaj kaj organizaj aspektoj*.

ĉ) Necesas utiligi la kongresojn laŭ 4.9.

d) Tre grave estas, ke oni certigu administran bazon en la Centra Oficejo de UEA. Ekzistas aro da taskoj, kiuj ĉiuj estas ligitaj al sciencaj aŭ fakaplikaj medioj kaj de granda strategia signifo. Ne plu eblas, almenaŭ sur internacia nivelo, administri ĉion ĉi-rilatan per honoroficaj fortoj. Mi celas i.a. la agadkampojn de CED, la tutan teron de la scienc-teknika kaj alifaka apliko de Esperanto, redaktado de fakmaterialoj, la evoluantan laboron de la Terminologia Esperanto-Centro kaj ankaŭ la necesan administran subtenon de la Akademio de Esperanto. Ĉio ĉi estas pli ol sufiĉa por multflanka kaj erudicia "scienca oficisto" en la Centra Oficejo.

Kaj fine ni volas reatentigi pri la ideo de "Internacia Konsilantaro: Esperanto - lingvo kaj movado"¹², kiu havus realan taskon internaciskale kunordigadi, organizi spertintersaĝojn, ellabori rekomendojn kaj alimaniere stimuli ankaŭ la interlingvistikan, esperan-

tologian agadon, kiu estus de granda valoro por similspecaj aktivecoj sur la landa nivelo.

La scienco fariĝis produktiva forto. Ni uzu ĝin.

1.- Pri la faktoroj influantaj aparte la Esperanto-movadon en kelkaj socialismaj landoj kp: D. Blanke: *Pri specifaĵoj de la Esperanto-movado en kelkaj eŭropaj socialismaj landoj*. En: *der esperantist*, 22 (1986), n-ro 140 (6), p. 121-125.

2.- Ekz. H. Tonkin: *Language problems in international relations. A select bibliography*. En: *International Language Revue*, Denver, n-roj 44-49 (1965-1967). Vidu krome la literaturindikojn ĉe D. Blanke: *Internationale Plansprachen*. Berlin, 1985, p. 304-317.

3.- Kp. la ampleksajn literaturindikojn ĉe D. Blanke, *citita ioko* 1985, p. 337-367.

4.- D. Blanke: *Plansprache und Nationalsprache. Einige Probleme der Wortbildung des Esperanto und des Deutschen in konfrontativer Darstellung*. *Linguistische Studien*, Reihe A, Arbeitsberichte, Nr. 85, Berlin: Akademie der Wissenschaften.

5.- D. Blanke, *citita sub 2*.

6.- Kp. la bibliografion en *Informilo por Interlingvistoj*, Varsovio, Akademia Centro Interlingvistika, kajero 10, aprilo 1986, p. 1-67.

7.- *Sprachwissenschaftliche Informationen*. N-ro 11/1+II nomiĝas: *Bibliographie zur Sprachwissenschaft der DDR für das Jahr 1986*. Berlin. Akademie der Wissenschaften, 1987. 300 p. En ĉi tiuj volumoj estas 53 indikoj pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj temoj, ankaŭ en Esperanto.

8.- St. Kosecky (Red.): *Problémy interlingvistické Zborník materiálů z interlingvistického seminára (Vysoké Tatry 20-22 mája 1987)*. Bratislava: Jazykoverný ústav L'Stúra SAV, Slovenský esperantský zväz, český-esperantský zväz, 1987. 179 p.

9.- Kp. la superrigardon pri la seminario en *Informilo por Interlingvistoj*, kajero 6 (junio 1985), p. 1-10.

10. Jam aperis 6 volumoj. Jen la 6-a: T. Ejsmont (Red.) *Miedzynarodowa komunikacja jezykowa. Materiały konferencyjne VI*. Łódź: Uniw. Łódzki. Studenckie koło Naukowe Esperantystów, 1986, 239.

11.- Kp. en *Esperanto* 11/1987, p. 194.

12.- Kp. D. Blanke: *Atingoj kaj problemoj de la 100-jara Esperanto*. En: *Esperanto*, 12/1987, p. 209-210. ☺

Deziras korespondi...

En tiu ĉi rubriko ni aperigos viajn korespondpetojn aŭ anoncetojn. Serĉu en ĝi korespondamik(in)ojn kaj praktiku la lingvon.

SOVETA UNIO

Jula Demidova, 14 j. lernantino, interes. pri ĵurnalismo kaj ĉ. aliaj temoj: ul. Rossijskaja 161-47, SU-454104 Ĉelabinsk, USSR.

Eugeno Vakulko, 15 j. lernanto de medicina lernejo, interes. pri medicinaj sciencoj (eble tradicia popola medicino), amatoraj kantoj: ul. Kuznecova 10-25, SU-454028 Ĉelabinsk, USSR.

Marina Prisĉepa, 15 j. lernantino, dez. kor. pri matematiko, amatora kanto, muziko de "The Beatles", kolektas poŝtmarkojn, monerojn: ul. Cvillinga 61-65, SU-454091 Ĉelabinsk, USSR.

Irina Glenko, 15 j. lernantino, dez. kor. pri Esperanto, muziko, biologio: ul. N. Kovsovoj 3-3, SU-454028 Ĉelabinsk, USSR.

Vladimir Polanski, 19 j. lernanto de foto-lernejo, dez. kor. pri fotado, politiko, moderna muziko k.a.: ul. Kurĉatova 8-60, SU-454092 Ĉelabinsk, USSR.

Denis Polanski, 14 j. lernanto, dez. kor. pri interlingvistiko, E-movado, historio, k.a. ul. Kurĉatova 8-60, SU-454092 Ĉelabinsk, USSR.

Aljona Aristova, 25 j. ekŝflegistino, okupiĝas pri geologio, ŝatas kulri, foti, triki, ŝufiĉe ofte vojaĝas: ul. Kantemirovskaja 5/3/633, SU-115304 Moskvo, USSR.

Sergej Kolobanov, 25 j. studento, dez. kor. pri radio-amatorismo, ŝatas tablan tenison, poŝtmarkojn, bildkartojn kaj insignojn: ul. Butlerova 3/1402, SU-117485 Moskvo, USSR.

Komencantaj e-istoj, sed spertaj biologoj (knabinoj 10-17 jaraj kaj gvidantino) dez. kor. tutmonde pri ekologiaj problemoj k.a., dez. interŝanĝi semojn de floroj: M. L. Filatova, Proletarskij prospekt 5a, SU-332440 Berdjans Zaporozskoj obl., USSR.

Fonto de pluraj koresponddeziroj el Moskvo: *Esperanto-Klubo*, ul. Volĥonka 13, SU-119820 Moskvo, USSR

ĈEĤOSLOVAKIO

KPM - Esperanto, Zapotockeho ul. MeDPM CS -384 11 Netolicé, Ĉekoslovakio
(*Esperanto-Klubo Infana*)